

Jesuo: Dio, la Filo – aŭ Filo de Dio?

Populara Opinio

Laŭ populara opinio, Jesuo estas Dio, la Filo; ĉiamaniere egala al Dio, la Patro, kun kiu li ekzistas de eterne, kune kun Dio, la Sankta Spirito; tri Personoj, tamen Unu Dio; alivorte, Triunuo en Uneco; por fariĝi nia Savanto, Jesuo forlasis la ĉielon kaj malsupreniris por esti naskita de la virgulino Maria.

Deveno de pagana filozofio

Ĉu tiu koncepto de Triunuo devenas senpere el la Biblio, aŭ ĉu ĝi estis trudita al kristanismo de eksteraj influoj? Unue, estas rimarkinde, ke la esprimo 'Dio, la Filo' ne troviĝas en la Biblio, kaj unu teologo, kvankam kredante mem je la Triunuo, konfesis, ke la apostolo Paŭlo mem ne povus kompreni la signifojn de la terminoj uzitaj en la teologia formulo, pri kiu la oficiala eklezio de la kvina kaj sesa jarcentoj fine konsentis.

La 'Fruaj Patroj de la Eklezio' – teologoj, kiuj skribadis en la periodo 100-300 pK, nenion sciis pri la Triunuo. La plejmulto da ili certe ne kredis, ke Jesuo estas 'kunegala al, kaj kuneterna kun la Patro'. Male, oni rigardis lin kiel 'kreitan Estulon', submetitan al la Patro.

Kiel kaj kial do tiuj ideoj poste disvolviĝis? La respondo estas, ke la kristana teologoj volis, ke Eklezia doktrino fariĝu respektinda ĉe la tiamaj filozofoj paganaj. La reganta filozofio devenis de la greko Plato, kiu instruis, ke de la Dia menso elfluas Inteligenteco, aŭ 'Logos' (greka = vorto). La juda filozofo Filo personigis tiun 'Logoson' kaj nomis ĝin 'dua Dio', atribuante al ĝi la kreon de la mondo.

En tempo, kiam tia filozofio estis moda, la ekleziaj estroj embarasiĝis pri la krucumiĝo de Jesuo, ĉar oni rigardis morton per krucumo kiel hontindan sorton de sklavoj aŭ krimuloj. Ili kaptis la okazon plialtigi Jesuon, identigante lin kiel tiun 'Logoson' aŭ 'duan Dion'. Estiĝis, do, la dogmo, ke Jesuo ekzistas dekomence en la ĉielo kune kun sia Patro, ke li estas tute egala al la Patro, kaj ke estas fakte li, kiu kreis la mondon. Sekvis akra polemiko inter la ekleziaj estroj dum pli ol jarcento. Per la decidoj de la ekleziaj koncilioj en la kvara kaj kvina jarcentoj, la aŭtoritatoj celis subpremi ĉiujn 'ribelulojn'; disvolviĝis la oficiala dogmo pri la Triunuo, kaj oni fine deklaris ĝin deviga por ĉiuj kristanoj.

Kion diras la Biblio?

Ni intencas tute malatenti nurajn homajn kaj paganajn elpensitaĵojn, kaj esplori la Bibliion mem por eltrovi la veron pri la Sinjoro Jesuo Kristo. El la Biblio ni lernas, ke dum periodo de proksimume du jarmiloj la Judoj estis la popolo de Dio. Ĉi Tiu malkaŝis Sin al ili ĉe la monto Sinaj, donante al ili Sian leĝon. Pli malfrue Li sendis profetojn por ke tiuj instruu la popolon pri Liaj ordonoj kaj intencoj. Tute tra tiu periodo la Judoj firme kredis al unu sola Dio, kontraste al la pluralismo trovita inter la ĉirkaŭantaj nacioj, kaj eĉ ĝis nun ili trovas la koncepton de Triunuo granda baro kontraŭ akcepto de

kristanismo. Judaismo efektive havas nur unu bazan ideon pri Dio, tio estas, Lian unuecon, *“Aŭskultu, ho Izrael! la Eternulo, nia Dio, la Eternulo estas unu sola.”* (Readmono 6:4).

‘Kristo’ (greka) kaj ‘Mesio’ (hebrea) estas vortoj, kiuj havas la signifon ‘sanktoleito’. La granda temo de la Malnova Testamento estas, ke leviĝos iu, nomata Mesio, estante ido kaj de Abraham kaj de David, kiu restarigos la regadon al Izrael (Agoj 1:6), reĝos sur la trono de David por ĉiam, kaj venigos benon, ne nur al Izrael, sed ankaŭ al ĉiuj nacioj. En la dua Psalmo Dio difinas Sian Sanktoleitan kiel ‘Mian Reĝon, kiun Li starigos *“... super Cion, Mia sankta monto.”* Sekvas la deklaro: *“Vi estas Mia filo, hodiaŭ Mi vin naskis. Petu Min, kaj Mi donos al vi popolojn por heredo, kaj por posedo limojn de la tero.”* (v.2,6-8).

Antaŭ la naskiĝo de Jesuo, al Maria venis anĝelo, kiu diris, *“Vi naskos filon, kaj vi nomos lin Jesuo; li estos granda, kaj estos nomata Filo de la Plejaltulo; kaj Dio, la Eternulo, donos al li la tronon de lia patro David; kaj li reĝos super la domo de Jakob eterne, kaj lia regno ne havos finon.”* (Luko 1:31-33)

Estas do certe, ke Jesuo estis la promesita Mesio, aŭ Kristo. Sed estas ankaŭ klare, ke li ne estas mem Dio, sed la Filo de Dio, mirakle naskita per la Sankta Spirito, tio estas per la potenco de Dio. (v.35). *“Hodiaŭ Mi vin naskis.”* Li komencis ekzisti je tiu tago, en kiu li estis naskita.

Tute tra la Nova Testamento, Dio, la Patro kaj Kreinto, estas distingita de la Sinjoro Jesuo Kristo. Tipa, el la saluto de Paŭlo al la eklezio en Romo, estas la jeno: *“Graco al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo”* (Rom. 1:7). Jen alia ekzemplo: *“Ĉar ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo.”* (1Tim.2:5)

La supereco de la Patro

Tute tra la periodo de sia servado, Jesuo substrekis la fakton, ke li ne estas egala al sia Patro. *“La Filo ne povas per si mem fari ion, krom tio, kion li vidas la Patron faranta”.* (Johano 5:19); *“Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis”.* (7:16). *“La Patro estas pli granda ol mi”.* (14:28). Kiam la Judoj diris, ke li “pretendas esti Dio”, li malakceptis tiun akuzon, dirante, *“Mi estas la Filo de Dio”* (10:34-36). Eĉ pli miriga estas lia diro, kiam iu adresis lin kiel *“Bonan Majstron”*; *“Kial vi nomas min bona? neniŭ estas bona krom Unu, nome Dio.”* (Marko 10:18)

Rimarkinde estas ankaŭ tio, ke li ne estis ĉioscia; priparolante sian estontan revenon, li diris, *“Sed pri tiu tago kaj la horo scias neniŭ, eĉ ne la anĝeloj en la ĉielo, nek la Filo, sed nur la Patro.”* (Marko 13:32)

Laŭ Jesuo mem, en ĉio la Patro superis; la Filo dependis de Li.

Daŭra supereco de la Patro

Sekvantoj de la Triunua dogmo povus kontraŭdiri, ke ĉiuj tiuj citaĵoj aplikiĝas nur al Jesuo dum sia tera vivo, *“... en siaj karnaj tagoj”* (Heb. 5:7), ne al Jesuo nun, ne al ‘...Dio, la Filo’. Ni do

konsideru unue eventon el la periodo tuj post la releviĝo de Kristo. Post kiam li reviviĝis, Jesuo parolis kun Maria Magdalena apud la tombo, kaj diris al ŝi, “... iru al miaj fratoj, kaj diru al ili; Mi supreniras al mia Patro kaj via Patro, kaj al mia Dio kaj al via Dio.” (Johano 20:17). Se Jesuo tiam estis plensence mem Dio, kial li parolis pri ‘mia Dio’?

Tamen pro la fakto, ke tiam Jesuo, kvankam releviĝinte, ankoraŭ ne supreniris en la ĉielon, ni referencu al Apokalipso, datita kun sufiĉe da certeco ĉirkaŭ la jaro 90pK. Ni trovas ĉi tie, ke la releviĝinta kaj glorita Sinjoro mem aludas al sia propra interrilato kun Dio la Patro. Observu unue, kiel Apokalipso komenciĝas: “*Apokapilso de Jesuo Kristo, kiun Dio donis al li, por montri al siaj servantoj tion, kio devas baldaŭ okazi ...*” (Apokalipso 1:1).

En la fruaj ĉapitroj Jesuo alparolas al la ‘sep eklezioj en Azio’ (1:4), kaj aludas kelkefoje al Dio, sia Patro:

“*La venkanton mi faros kolono en la templo de mia Dio ... kaj mi skribos sur li la nomon de mia Dio ...*” (3:12)

“*Al la venkanto mi donos sidiĝi kun mi sur mia trono, kiel ankaŭ mi venkis kaj sidiĝis kun mia Patro sur Lia trono.*” (3:21)

Ni substrekas la fakton, ke tiuj estas la vortoj de Jesuo mem, eldiritaj ĉirkaŭ 60 jaroj post kiam li supreniris en la ĉielon kaj prenis la honorlokon dekstre de Dio. Ili priskribas do lian al Dio rilaton, en lia nuna glorita stato. La ĝenerala senco estas klara; estas Dio la Patro, kiu havas superegan aŭtoritaton; estas la Patro, kiu donas Apokalipson al Sia Filo; estas Lia trono en kiu la Filo partoprenas; estas Li, kiun la Filo agnoskas kiel “mian Dion”. Estas nenia sugesto pri egaleco en ĉi tiuj deklaroj.

Sed plej frapanta el ĉio estas diro de Paŭlo en la unua Letero al la Korintanoj, ĉapitro 15. Temas pri la estonta surtera regado de Jesuo; tiu reĝos dum mil jaroj, ĝis ĉiuj malamikoj estos detruitaj; “*La lasta neniigota malamiko estas la morto. Ĉar: Ĉion Li (Dio, la Patro) metis sub liajn piedojn. ... Kaj kiam ĉio estos submetita al Li, tiam ankaŭ la Filo mem estos submetita al Tiu, Kiu submetis ĉion al li, por ke Dio estu ĉio en ĉio.*” (vs.26-28).

Denove estas do substrekite, ke la Patro superas la Filon, kiu estos submetita al Li. Ni povas do rigardi la aferon kiel jam deciditan; oni devas simple forĵeti ian ideon pri egaleco inter la Filo kaj la Patro. Ne eblas pli klare esprimi la subecon de la Filo.

La Karaktero de la Filo

Laŭ populara Triunua teorio, la Filo ekzistas (kune kun la Patro kaj la Sankta Spirito, tri Personoj tamen unu Dio) kiel aparta Persono antaŭ ol lia patrino Maria naskis lin. Se tio estus vera, lia karaktero devus esti jam tute perfekta antaŭ lia naskiĝo, bezonanta nenian disvolviĝon aŭ perfektigiĝon, Sed laŭ la Biblio, lia karaktero disvolviĝis post lia naskiĝo, en tute natura maniero, same kiel la cetero de la homa raso. “*Kaj Jesuo progresis en saĝeco kaj staturado, kaj en graco ĉe Dio kaj homoj.*” (Luko

2:52). En Hebreoj 2:10, ni legas, ke Dio perfektigis lin “*per suferado*”, kaj ni devas konkludi, ke denove temas pri disvolviĝo de karaktero, ne pri karaktero jam perfektigita.

Jesuo, Filo de Homo

Aparte studinda estas la rakonto, ekzemple en Luko 22:39-46, pri lia preĝo en la ĝardeno Getsemane, tuj antaŭ ol oni arestis lin. “*Patro, se Vi volas, formetu de mi ĉi tiun kalikon; tamen plenumiĝu ne mia volo, sed Via.*” Flankenmetante siajn naturajn dezirojn, li elektis plenumi la volon de sia Patro. Evidentiĝas, ke por li, la volo de lia Patro devis superregi lian propran deziron, kiu povus eĉ kontraŭi la intencon de Dio! Tiu penso kondukas nin al konsidero de la homa naturo de Jesuo.

Kvankam mirakle naskita per la Sankta Spirito, (kiu estas simple la potenco de Dio, ne la tria Persono en Triunuo, egale al la Patro), Jesuo estis tute homa; same kiel ni, li suferis tentadon. Ni jam atentigis la leganton pri tio, ke Jesuo estas “... *interulo inter Dio kaj homoj*”. Por esti interulo kaj ĉefpastro, li devis mem esti mem vere homa, povante “... *indulgi tiujn, kiuj estas malkleraj kaj erarantaj*” (Hebreoj 5:2). “*Ĉar ni havas ĉefpastron ne tian, kiu ne povus simpatii kun niaj malfortaĵoj, sed tentitan en ĉio tiel same, tamen sen peko*” (Hebreoj 4:15). (Tiu, kiuj kredas je la Triunuo, ofte trovas malfacilon akcepti, ke en ĉio Jesuo estis tentata, same kiel ni). Kontraste, ni legas, “... *ĉar Dio ne estas tentebla de malbono*” (Jakobo 1:13)

Kaj ne estis tiel, ke de li la sagoj de tento estis deturnitaj kvazaŭ li portus kirason. Foje, rezisti estis malfacilege; “... *estante en agonio, li preĝis pli fervore, kaj lia ŝvito fariĝis kiel gutoj da sango, defalantaj sur la teron.*” (Luko 22:44). Li bezonis helpon, kaj ĝin ricevis, “*Kaj aperis antaŭ li anĝelo el la ĉielo, fortigante lin.*” (vs. 43).

Estis pro tiaj spertoj, ke li fariĝis “... *kompatema kaj fidela ĉefpastro en la aferoj de Dio. ... ĉar per tio, ke li mem, tentate, suferis, li povas helpi la tentatojn.*” (Hebreoj 2:17-18). Ankaŭ ni povas atendi tian helpon en tempo de bezono; “... *fidela estas Dio, kiu ne lasos vin esti tentataj super via forto; sed kune kun la tento ankaŭ faros la forkurejon, por ke vi povu ĝin elporti.*” (1 Korintanoj 10:13)

La grandeco de Jesuo

Necesas aliflanke ke ni, emfazinte la subecon de Jesuo rilate al Dio la Patro, ne subtaksu lin, kiu “...*estante la elbrilo de Lia (t.e. Dio) gloro kaj plena bildo de Lia substanco, kaj subtenante ĉion per la vorto de sia potenco, kaj farinte la elpurigon de niaj pekoj, sidiĝis dekstre de la Majesto en altaĵoj; fariĝinte tiom pli granda ol la anĝeloj, kiom pli bonegan nomon ol ili li heredis*” (Hebreoj 1:3-4). “... *li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco. Pro tio do Dio tre alte superigis lin, kaj donis al li nomon, kiu estas super ĉia nomo, por ke en la nomo de Jesuo kliniĝu ĉiu*

genuo ... kaj ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro, al la gloro de Dio, la Patro.” (Filipianoj 2:9-10).

Nepre rimarkinde estas, ke tiun gloran altigecon li ne posedis en si mem, de eterne; ĝin donis al li Dio, post lia releviĝo, pro tio, ke li “... *fariĝis obeema*”.

Ni legu zorge

La gravecon de zorga legado de la Vorto de Dio oni povas illustri per ekzemplo. Jesuo iam diris al la Judoj, “*Mi kaj la Patro estas unu*” (Johano 10:30). Leginte nur tion, sen plena scio de ĉio, kion diris la Sinjoro, oni povus ricevi tute erarigantan impreson pri la rilato inter Jesuo kaj lia Patro. En sia mirinda preĝo, en la 17-a ĉapitro de la sama evangelio, Jesuo diris, “*Kaj mi preĝas ne nur por ili (la disĉiploj), sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; ... por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu.*” (Johano 17:20:22). Iusence do, (kompreneble, ne ĉiusence – Jesuo estas ja unika!), ĉiuj kredantoj povas havi la saman rilaton kun la Patro, kiel tiu, kion Jesuo havas! Evidente, la rilato, kiun Jesuo preparolis, estas la sama, kiel tiu, pri kiu Paŭlo skribis al la Korintanoj, dirante, ke ili estu “... *perfekte kunigitaj en la sama spirito ..*” kaj “.. *unuanimaj ..*” (1Kor. 1:10; 2 Kor. 13:11).

Internacia Biblio-Misio, 50 Wissage Road, LICHFIELD, WS13 6SW, Anglio.